


La Riverego

Bulteno de la Esperanto-Societo Kebekia
Printempo de 1992. N^o 26^a. Jarkolekto 7^a 0,50\$

Le mouvement espérantiste: tout le monde y a sa place



**On vous attend à Sainte-Catherine-de-Hatley,
du 12 au 14 juin 1992**

Enhavo

La takteco: une application à la chanson	p. 3
Les ateliers de l'OEA / OEA Kadrokursoj	p. 6
Kiel efike raporti?	p. 8
Qui est Normand Fleur?	p. 9
Ĝenerala kunveno	p. 11
Informations sur le congrès de Montréal.....	p. 11-12
Societaj informoj.....	p. 13
Rencontre estivale / Somera renkontiĝo	p. 14
Le non-anglais à l'université	p. 16
Tro da misuzado pro la konfuzo	p. 16
Tabuaj vortoj en Esperanto, aŭ: la fivortaro	p. 17
Ĉu vi pentas?	p. 18



La Riverego

Bulletin trimestriel de la Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia.

Aperas trimonate. Eldonkvanto: 250

ISSN 0830-9574. Dépôts légaux: bibliothèques nationales du Canada et du Québec.

Premier trimestre 1986.

Redaktis: Sylvain Auclair

Grafike aranĝis: Graphicom inc.

Kunlaboris Jean-Claude Bélanger, Manuel Campagna, Normand Fleury,

Sylvain Quirion kaj Yvon Roux.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Senpage por la membroj de E.S.K.

Por la aliaj: jara abono: 5\$ por mara sendo; 6\$ por aera sendo.

UEA-kodo: kebk-d.

Unuopa numero: 0,50\$, plus sendokostoj.

Limdato por la venonta numero: 1^a de junio de 1992

Esperanto-Societo Kebekia

6358-A, rue de Bordeaux

MONTREAL

QUÉBEC

H2G 2R8

telefonrespondilo: (514) 272-0151

La «takteco»: une application à la chanson

Jean-Claude Bélanger
DE L'INSTITUT DE RECHERCHE MUSICALE PANTONAL

Nous avons vu dans le dernier numéro de *la Riverego* les grandes lignes de l'aspect qualitatif du rythme appliqué au langage.

En musique, on parle habituellement de takteco en termes de temps et de contretemps. Par exemple, une noire (♩) se subdivise en deux croches (♪), la première et au temps (**tak**) et la seconde au contretemps (**to**). Chaque blanche se subdivise en deux noires dont la première est au temps (**tak**) et l'autre au contretemps (**to**). (Voir l'illus. 1).

Un **tak** est une valeur dont le début coïncide avec le début d'une valeur plus grande; un **to** est une valeur dont le début ne coïncide pas avec le début d'une valeur plus grande. Toute valeur est donc composée d'un **tak** suivi d'un **to** au niveau plus petit.

Toute note plus longue que la valeur du petit niveau ne possède pas le **to** de ce niveau — exemple la mélodie «Au clair de la lune». (Voir l'illus. 2).

Les deux blanches ne possèdent pas de **to** noire et la blanche finale ne possède même pas de **to**. Dans un groupe de quatre valeurs, dans cet exemple les quatre noires, la deuxième peut être en rebondissement (**takto**) de la première (position y) si une virgule la

suit, ou en levé (**totak**) de la troisième (position x) si une virgule la précède.

Prenons une traduction littérale en espéranto des deux premières phrases de «Au clair de la lune» pour en étudier la takteco.

Ĉe la lunbrileto,
Amiko Petro,
Pruntu vian plumon,
Por skribi vorton.

«**Ĉe la lunbrileto**» est en position y, «**Pruntu vian plumon**», en position x. La takteco de ces deux exemple coïncide parfaitement avec celle de la mélodie. (Voir les illus. 3 et 4).

Par contre, la takteco de «**Amiko Petro**» et de «**Por skribi vorton**» ne coïncide pas et ces paroles ne sont donc pas compatibles avec la musique.

Dans ce cas, on se doit d'ajuster soit la musique au rythme des mots, soit les mots au rythme de la musique. Ici, puisqu'il s'agit d'un air traditionnel et non d'une composition, nous nous contenterons de trouver des mots qui conviennent, au moins pour notre propos. Par exemple, nous pouvons remplacer «**Amiko Petro**» par «**Mia kara Luk'**» ou «**Kara Frederik'**», et «**Por skribi vorton**» par «**Skribi devas mi**».

Ĉe la lunbrileto,
 Kara Frederik'
 Pruntu vian plumon,
 Skribi devas mi.

Ainsi, il n'y a plus deux rythmes qui font interférence dans l'oreille de l'auditeur. L'auteur ou le traducteur, en plus d'obtenir une chanson plus élégante, se fera beaucoup mieux comprendre par son public.



Illustration 1




Illustration 2




Illustration 3





Illustration 4



Ĉe la lun-bri-let- to a- mi- ko Pe- tro

Prun-tu vi- an plu- mon Por skri-bi vor- ton;

À propos de l'Association canadienne

Certains lecteurs ont pu déceler un certain manque de retenue dans l'article sur l'association canadienne d'espéranto, en page 5 de notre dernier numéro. Les relations en la S.Q.E. et l'A.C.E. se sont depuis lors considérablement améliorées. Ontario Esperanto-Asocio

La Ontario Esperanto-movado multege kreskas

«Ŝajnas, ke la Ontario Esperanto-movado multege kreskas — precipe en la sudorienta regiono — kaj pro tiu fakto taŭgas, ke OEA kongresos en Uaterluo ĉimaje.» Tiel la Vicprezidanto kaj interima Prezidanto de OEA — Mikaelo Liĉa — anoncis, ke la Kvara Ontario Esperanto-Kongreso okazos ĉe Uaterluo-Universitato en Ontario Sudo, de la 15^a ĝis la 18^a de majo. Mikaelo, studento pri scienco en tiu universitato, estas ankaŭ prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, kies konsiston li baldaŭ anoncos.

Espéranto-Jeunesse

L'Organisation de la jeunesse espérantiste du Québec (OJEQ) est officiellement l'instance qui invite le congrès jeunesse. Mais elle a éprouvé des difficultés à vivre une vie autonome de celle du congrès et à organiser d'autres activités. Ses dirigeants (et fondateurs) se sont récemment réunis, et ont décidé de recontacter leurs membres et ami-e-s en vue d'une rencontre prochaine: il faut qu'il y ait une vie après août 1992!

Les ateliers de l'OEA / OEA- Kadrokursoj

L'article qui suit reprend le texte d'un dépliant intitulé Nos ATELIERS (ISBN 0 929031 12 1), réalisé par Manuel-M. Campagna, traducteur agréé, à partir de remarques préliminaires en espéranto qu'il a adressées aux participants d'un atelier de l'OEA, et que Michael R. Leach, a consignées. Il est suivi d'un modèle en espéranto de rapport d'atelier.

La sekvanta artikolo reuzas la tekston de faldfolio realigita de Manŭelo Kampanjaĥa, tradukisto atestita, sub la titoloj Nos ATELIERS (ISBN 0 929031 12 1) kaj WORKSHOPS (ISBN 0 929031 10 5). Tiu teksto fontas el la reviziado kaj ampleksigo de rimarkoj de li faritaj dum OEA-kadrokurso kaj notitaj de Mikaelo Liĉa. Sekvas Esperanto-modelo de kadrokursa raporto.

Des ateliers coopératifs

Nos ateliers coopératifs se distinguent comme la réalisation culturelle par excellence de notre association.

Entre les Rencontres automnales de fin de semaine de 1989 et 1991, nos événements n'ont guère attiré la foule. C'est ainsi qu'a évolué au sein de notre association une **culture bien particularisée** par rapport au reste de la communauté espérantophone. De toutes nos institutions, notre tradition d'ateliers est celle qui confère à notre association une distinction culturelle et intellectuelle enviable.

Nos ateliers tendront sûrement à se diversifier, mais ils se classent tous nettement en **deux grandes catégories** pour le moment: les ateliers en espéranto portant sur les techniques générales d'organisation et les ateliers en anglais portant sur l'acquisition et la diffusion de l'espéranto. Il y aura aussi des ateliers bilingues, en français ou en d'autres langues quand les participants, les participantes, le demanderont.

Nos principes pédagogiques

C'est comme **égaux, égales, que nous siégeons autour d'une table**

pour échanger activement sur un sujet choisi informations, expériences, idées, suggestions, problèmes et solutions. En effet, le savoir, tant théorique que pratique, se trouve déjà chez les participants et participantes; il suffit de le mettre en commun pour le redistribuer à tous et à toutes.

Notre modérateur ou modératrice invite à son tour **chaque participant, chaque participante, à intervenir**. Grâce à cette méthode, la période de questions devient à peu près superflue, puisque les interventions fournissent les réponses avant qu'on ait besoin de les demander.

La leçon ainsi élaborée en commun est ensuite révisée puis distribuée à toute l'association.

La sélection des sujets par les participants et participantes, autre principe essentiel, se fait en deux étapes. La compilation des suggestions fournies, tant par le sondage des nouveaux et nouvelles membres que par la révision annuelle des dossiers des membres par chacun et chacune, indique les plus populaires, qui sont proposées aux membres dans la trousse de documentation de chaque événement. Ce véritable référendum détermine les sujets

des ateliers.

Les techniques d'organisation

Nombre de membres (sinon la plupart) font montre d'inexpérience dans la participation aux associations et même d'ignorance des techniques élémentaires de *réunion*. On ne saurait cependant leur en vouloir, puisque c'est le cas de la plupart de nos concitoyens, et l'école ne les leur enseigne pas.

Les techniques d'organisation se taillent donc une part considérable dans les sujets d'atelier. Naturellement, elles ont leur utilité aussi bien chez nous qu'ailleurs.

Voici quelques sujets déjà traités:

- comment participer efficacement à une réunion
- comment préparer un rapport
- comment préparer un dossier sur lequel on se prononcera à une réunion

Le mouvement espérantiste

Cette catégorie ne retient pas moins l'attention que la première. On a grand besoin de partager ses idées sur **la façon de devenir espérantophone** (locuteur de l'espéranto) et **celle de devenir espérantiste** (partisan de l'espérantisme)

Ces ateliers ont généralement lieu en langue nationale tant pour offrir aux débutants, aux débutantes, une situation confortable au cours d'une rencontre, que pour les aider à suivre la voie de l'espéranto et de l'espérantisme. Il arrive souvent qu'ils n'en reviennent pas de savoir déjà eux-mêmes l'essentiel.

Voici quelques sujets déjà traités:

- comment organiser le mouvement espérantiste dans une localité de moins de deux espérantophones
- comment progresser (seul ou avec d'autres) dans l'apprentissage de l'espéranto

Les autres sujets

Une fois passé l'urgence des sujets des deux catégories décrites, il sera souhaitable d'avoir des ateliers sur la littérature et les services existant dans la communauté espérantophone. Pourquoi pas des ateliers sur la réalisation de dépliants d'information ou l'utilisation de votre traitement de texte (ne pas confondre ordinateur et machine à écrire!). Pourquoi pas sur les lichens d'Islande, le macramé et la mécanique automobile, sur les premiers secours, le chant choral et le sexe sécuritaire, sur l'observation du ciel nocturne ou des oiseaux et la collection des papillons diurnes, sur la macrobiotique, les mathématiques et la linguistique, sur l'histoire de Chine, les Upanishad et Harry Harrison?

Votre participation

En fin de compte, ce que nous recherchons, ce sont **vos connaissances et votre participation** à cette expérience enrichissante.

Faites connaître l'espéranto! La S.Q.E. dispose de tout nouveaux petits posters, de la taille d'une feuille ordinaire, à afficher partout. Faites-en venir pour mettre dans votre entourage!

Vous pouvez aussi faire venir des dépliants pour distribuer à vos ami—e—s et connaissances. N'hésitez pas!

Diskonigu Esperanton! Senpage mendu de E.S.K. novajn afiŝetojn (samgrandajn kiel ordinarajn foliojn) kaj dismetu ilin en via ĉirkaŭaĵo!

Vi povas ankaŭ venigi franclingvajn flugfoliojn por disdoni al geamikoj kaj gekonatoj. Ne hezitu!

Temo

KIEL EFIKE RAPORTI

Partoprenas

BRIZBŬA Rajmondo, KAMPANJAĤA Manŭelo (estras)
LIĈA Mikaelo (raportas), ŬALKRA Henĉjo

Ĉiam oni komencu per la **historio** de la koncernata demando. Unue **numerigu** la partojn. Klarigu la **mandaton de la komisiito** kaj la fonton de la mandato. Klarigu la **metodon**, kiun vi sekvis por plenumi la taskon. Nun vi pretas klarigi la **paŝojn**, kiujn vi faris por atingi la celon. Detale klarigu la **analizon** de la kontribuaĵoj kaj la rezultintajn **konkludojn**. Surbaze analizojn kaj konkludojn viajn kaj fakulajn, faru **rekomendojn**. Post ĉiu rekomendo donu la **kialojn**.

Informiĝu. Trovu aliajn similajn raportojn. Uzu ilin, kiel fonton; kunmetu la bonajn elementojn el ĉiuj.

Antaŭ ol prezenti vian raporton, faru kunmetaĵon el ĉiuj **malnovaj raportoj** rilate la demandon kun la via. Ĉi tio kun eventuala aprobo de la komitato fariĝos oficiala raporto sendota kiel informilo al membroj kaŭ bibliotekoj kaŭ aliaj orga-

nizoj. Estus bona ideo, ke la komisiito **pridiskutu rekomendojn** kun aliaj komitatanoj por certigi, ke en ili nenio mankas. Se vi ne havas rekomendojn pri iu parto de la demando, **priskribu la problemojn** en tiu fako. Ju pli ni komprenas la problemojn, des pli facile ni solvos ilin.

LKK-oj kaj **LRK**-oj devas fari raporton post ĉiuj eventoj, klarigante la situacion financan, sukceson ĝeneralan, problemojn, referindaĵojn, kaj tiel plu. Priskribu la metodojn uzitajn bonajn kaj malbonajn. Plie vi povas klarigi la historion de la evento: kiel ĝi okazis tie, kie ĝi okazis, antaŭaj similaj eventoj. Aldonu rekomendojn por venontaj eventoj.

Kadrokursoj kun lerte faritaj raportoj povas doni nehaveblan aliloke trejnadon.

La 12-erara teksto

En la jena teksto, enŝoviĝis 12 gramatikaj eraroj. Per atenta legado, vi retrovu ilin.

La defenso de nia pozicio, parte dependas de kuirastrajno, kiu okaze de forta atako, en kvin minutoj povas alveni el Madrid. Por ĝustatempe venigi tiu trajno, oni aranĝis kun rapido kamptelefono. Kiam la telefono estis pende fiksitaj kaj la laboristoj revenintaj, evidentiĝis, ke iuloke mankis kontakilon, por kio ĝi ne funkciis. Pli ol tri tagoj ni troviĝis tie, ĝis ke fine venis muntisto, kiu reparis la kontakton. Dum tiu tuta tempo, oni agrable amuzis sin kun la telefono... ne funkciante.

(La solvon vi trovos sur la 17a pago)



*Pour ceux qui
ne connaissent
pas encore
Normand...
et pour les autres*

Nous commençons une série d'articles visant à mieux faire connaître les participants actifs du mouvement espérantiste québécois. À tout seigneur, tout honneur...

Unua intervjuo kun aktivaj kebekiaj esperantistoj, por konigi ilin al la ĝenerala membraro, kaj tiel prezenti la «vivon de esperantistoj». Ni komencas per la prezidanto de E.S.K.

Qui est Normand Fleury?

Une personne qui s'intéresse à plein de choses; qui ne prend pas beaucoup de temps pour lui parce qu'il a toujours des projets à réaliser; une personne qui connaît plein de gens et qui de ce fait néglige ses amis.

Quels sont justement tes champs d'intérêt?

À vrai dire, ils changent au fil de ma vie. J'aime observer la nature depuis mon enfance. D'abord les oiseaux, puis les plantes, qui m'ont conduit à ma profession actuelle, technicien en horticulture. La pollution me préoccupe beaucoup et j'ai participé activement à la création du centre de la nature à Granby. J'ai collectionné plein de choses, fait de la sculpture sur bois, peut-être comme tout le monde à un moment ou l'autre de sa vie, mais main-

tenant, tout cela c'est fini. J'aimerais lire plus mais le temps manque, je me contente donc d'écouter de la musique tout en travaillant pour l'avancement de l'espéranto.

Depuis quand parles-tu l'espéranto?

Une autre passion, la plus importante dans ma vie à ce jour. Du moins celle qui dure le plus longtemps. À 18 ans, je me suis promis d'apprendre cinq langues dans ma vie. Après le français, l'anglais et l'espagnol, j'ai découvert l'espéranto lors d'un séjour en France en 1979. Depuis, j'ai appris l'italien, un peu de norvégien et de croate à cause de séjours dans ces pays, mais c'est l'espéranto qui m'a fasciné le plus par le génie de sa structure et l'ouverture sur le monde qu'il offre.

Pourquoi consacres-tu tant d'énergie à l'espéranto?

Pour plusieurs raisons. J'ai habité l'Europe durant près de trois ans, et malgré ma connaissance de trois langues importantes, je me suis souvent senti seul. Dès que j'ai appris l'espéranto, c'est comme si tout à coup le monde s'était ouvert à moi. Je me souviendrai toujours de mon premier congrès jeunesse, en Finlande, à l'été de 1980. Je ne parlais pas tellement bien l'espéranto, mais j'y ai quand même fait des rencontres inoubliables. Je correspond depuis lors avec un Soviétique, je devrais maintenant dire un Ukrainien, avec un Japonais et un Mexicain, pour n'en citer que trois. J'ai découvert que l'espéranto donne une culture et une ouverture mondiales. On change de pays, mais on utilise la même langue. Je travaille beaucoup pour l'espéranto parce que j'ai reçu beaucoup des espérantistes. J'ai vécu de grands moments de bonheur grâce aux amitiés que procure l'espéranto. Je me suis même marié à une espérantiste de Croatie, Zdravka Metz. Etre espérantiste, c'est ma façon d'améliorer le monde actuel. Certaines personnes autour de moi ne comprennent pas pourquoi je m'intéresse tant à des gens qui vivent de l'autre côté du globe. Je ne sais quoi leur répondre, mais ça me passionne.

Pourquoi as-tu décidé d'enseigner l'espéranto à tes deux enfants?

En fait, le tout s'est fait naturellement depuis leur naissance. Mon épouse ne parlait pas français à son arrivée au Québec en 1982. L'usage de l'espéranto comme langue familiale s'est bien ancré dans notre quotidien avant la naissance des enfants. Par la suite, les enfants ont assimilé l'espéranto au jour le jour, au même titre que le français et le croate. Je suis heureux des résultats puisque Damir (huit ans) et Mira (six ans) consi-

dèrent comme normal de savoir parler plusieurs langues.

Quelles sont tes responsabilités actuelles dans le mouvement espérantiste?

J'aimerais en avoir moins pour pouvoir mieux m'en occuper mais il y a tellement de choses à faire et peu de gens prêts à collaborer; j'en ajoute donc toujours un peu plus sur mes épaules. Je suis président de la Société québécoise d'espéranto depuis sa fondation en 1982. Les progrès sont lents mais je ne regrette nullement la décision prise à l'époque, de créer cette association. Je suis responsable de la librairie espéranto et vice-président de l'Association canadienne d'espéranto. Finalement, je préside le Comité organisateur du 48^e Congrès international de la jeunesse espérantiste.

Accordes-tu beaucoup d'importance à ce congrès?

Oui, beaucoup. Depuis un an, j'y consacre tous mes temps libres. Ce congrès, c'est un cadeau que j'ai voulu donner à tous les espérantistes, en retour de ce que j'ai vécu en Europe. Après le congrès, Montréal et le Québec seront mieux connus du mouvement espérantiste; je le fais donc aussi pour le Québec.

Merci.

Montréalaises et Montréalais, appelez *la Papago*, journal téléphonique espérantiste quotidien. Le numéro est le 270-0054. Pour plus d'information sur l'utilisation de *la Papago*, si vous disposez d'un téléphone à tonalités, composez #11, puis 102, après que la machine vous aura répondu.

Ĝenerala kunveno

La estraro de la Esperanto-Societo Kebekia oficiale invitas ĉiujn membrojn de la Societo ĉeesti la jaran ĝeneralan kunvenon, kiu okazos dimanĉon 14^{an} de junio de 1991, ekde la deka horo, ĉe la feriejo Aux Berges Dominique Savio, 545, chemin du Lac, en Sainte-Catherine-de-Hatley, okaze de la printempa renkontiĝo de E.S.K.

Tagordo

1. Malfermo: elekto de kunvenestro kaj de protokolanto; akcepto de la tagordo.
2. Akcepto de la protokolo de la lastaj du kunvenoj.
3. Raportoj de la estraranoj kaj demandoj.
4. Diskuto pri venonta agado.
5. Fermo.

Por la estraro, la sekretario-kasisto,



Sylvain Auclair

Aliĝu tuj al la Internacia Junulara Kongreso (I.J.K.) en Montrealo

Vi ja scias, ke la I.J.K. okazos en Montrealo ĉi-somere. Ni ĝojas anonci al vi, ke jam aliĝis ĉirkaŭ 110 personoj el 29 mondpartoj.

Ni nun invitas vin agi kiel ili kaj tuj aliĝi. Ĉu vi ne ŝatus esperantumi dum plena semajno kun Japanino, Italo, Nederlandanino, kaj eĉ Nepalano aŭ Pakistanano? Ni certas, ke vi plene ĝuos la etoson kaj ni nun aktive preparas plej allogan programon.

Do, jen invito partopreni internacian esperantan rekontiĝon en Montrealo Tio ja estas maloftaĵo... en Norda Ameriko.

Viverŝajne jam ricevis aliĝilon. Se vi

deziras ekhavi novan, simple kontaktu nin.

Se vi intencas partopreni, sed ne dormi en la Kolegio Maisonneuve, kie okazos la aranĝo, vi simple subtrahu 60\$ de la pagenda kotizo. Ni negocis favorajn kondiĉojn kun la apuda gastejo Wandlin, ĉe metrostacio de l'Assomption. Petu detalojn.

Se vi intencas nek dormi nek manĝi en la kolegio, tiam la kotizo por partopreni la tutan semajnan programon estas nur 75\$ ĝis la 1^a de aprilo. post tiu dato, la kosto estos 100\$. Agu tuj kaj vi ŝparos.

Fine, se vi intencas partopreni nur

kelkajn tagojn, vi povas pagi po 20\$ tage por ĝui la programon. Manĝaĵon vi ĉiam povos aĉeti surloke.

Ni plezure respondos viajn demandojn, ĉu skribe, ĉu telefone. Ni remencias, ke la movada respondilo tagnakte akceptas viajn mesaĝojn: (514) 272-0151.

Ni plej amike kaj movademe salutas vin kun la espero, ke ni ekkonos aŭ revidos vin dum la Montreala I.J.K.

Normando Fleury
nome de la Loka Kongresa Komitato

Les ami-e-s de vos ami-e-s...

Si vous voulez faire connaître l'espéranto à des parents ou ami-e-s, donnez-nous leurs noms et adresses, et nous leur enverrons de la documentation en votre nom. Vous pouvez même payer leur cotisation (5\$ par personne, pour une année) et ils pourront ainsi recevoir *la Riverego*.

Mieux vaut tôt que trop tard

Vous savez sûrement que le 48^e congrès international de la jeunesse espérantiste se tiendra à Montréal, de 2 au 9 août 1992. Nous sommes heureux de vous annoncer que déjà plus de 110 personnes de 29 pays s'y sont inscrites.

Nous vous invitons donc à faire de même. N'aimeriez-vous pas vivre cette expérience enrichissante?

Si vous pensez que vous ne parlez pas suffisamment l'espéranto, sachez que des cours pour débutants seront offerts à tous les jours. De plus, l'immersion totale que vous procurera le congrès vous permettra de progresser très rapidement.

Si vous ne désirez pas loger au Collège Maisonneuve, vous pourrez bénéficier d'une remise de 60\$ sur l'inscription. Nous avons négocié des tarifs de groupe avec l'auberge Wandlin, rue Sherbrooke, près du métro de l'Assomption. Demandez-nous les détails. Si vous ne désirez ni dormir ni manger au Collège, le tarif pour le programme seul n'est que 75\$ pour toute la semaine, si vous vous inscrivez d'ici au 1^{er} avril. Par la suite, il sera de 100\$.

Finalement, si vous ne pouvez prendre part qu'à quelques jours, vous pourrez acheter des entrées quotidiennes au coût de 20\$. Bien que ce prix ne comprenne pas les repas, vous pourrez acheter des repas à la cafétéria du Collège.

Pour de plus amples informations, nous restons à votre disposition: vous pouvez laisser un message, de nuit comme de jour, au répondeur du secrétariat: (514) 272-0151, ou nous écrire.

Au plaisir de vous rencontrer cet été.

Normand Fleury
pour le Comité organisateur

En la teatrejo

Dum la interakto de koncerto, spektanto transdonas bileton al la dirigento: Mi ne estas fidenuncisto, sed mi kredas esti devigata sciigi al vi, ke la viro, kiu frapas sur la tamburego, ludas nur kiam vi rigardas lin.

Societaj informoj

La Societo petis esti enskribita en la *Jarlibro* de la Universala Esperanto-Societo, kiel regiona asocio en Kanado. La rezulton povos vidi la individuaj membroj de U.E.A. Ni do invitas vin iĝi membro de la plej granda Esperanto-Asocio en la mondo: aliĝilon vi povos trovi en ĉi-tiu *Rivegego*.

La estraro komencis kampanjon por membrigi aŭ remembrigi eksajn membrojn de E.S.K., kaj ankaŭ tiujn informpetintojn, kiuj neniam aliĝis. Ni havas plurajn centojn da tiuj nomoj. Ĉiu ricevos inviton aliĝi.

La membroj de E.S.K. ekde nun ĝuos novajn avantaĝojn, nome: 10-%-an rabaton ĉe aĉeto en la Libroservo en Montrealo; senpagan liston de korespondpetintoj el la tuta mondo, laŭ peto; kaj pli favorajn prezojn ĉe kursoj kaj renkontiĝoj.

Ekde nun, tiuj membroj, kiuj remembris por tri jaroj kaj ĉe la ricevo de la unua alvoko, ĝuos pli favorajn kotizojn (krom la favor-kotizaj membroj, kiuj jam ĝuas plej favoran kotizon). La estraro tiel klopodas atingi pli fruan realiĝon kaj pli multajn trijarajn membriĝojn, kiuj ŝparas monon kaj laboron. Notu ĉi-tie, ke ankaŭ aliĝpagoj povas esti impostmalaltigaj, samkiel la donacoj.

La Societo nun uzas novan bankokonton; vi povas pri ĝi informiĝi.

Je la 1^a de marto, membris 117 homoj en la Societo.

Nemanquez pas les rencontres des clubs. À Montréal, contactez le 272-0151. À Sherbrooke, le 566-0732.

La Société a demandé à être inscrite à l'annuaire de l'Association mondiale d'espéranto (U.E.A.). Les membres de l'U.E.A. pourront bientôt voir si nous avons été acceptés. Nous vous invitons d'ailleurs à devenir membre de l'U.E.A., la plus grande association espérantiste au monde: vous trouverez un formulaire dans ces pages.

Le C.A. a entrepris une campagne pour amener l'adhésion des anciens membres, ainsi que des «demandeurs d'information» n'ayant jamais fait partie de la S.Q.E. Nous disposons d'un fichier de plusieurs centaines de ces noms.

Les membres de la S.Q.E. bénéficieront dorénavant des nouveaux avantages: un rabais de 10 p. 100 sur les achats à la librairie espérantiste de Montréal; la possibilité de recevoir gratuitement une liste de personnes du monde entier, désirant correspondre avec des Canadiens; et des meilleurs tarifs pour les cours et rencontres.

Désormais, les membres renouvelant leur adhésion pour trois ans et dès la réception du premier avis profiteront de meilleurs tarifs (sauf en ce qui concerne les «membres à cotisation réduite»). Le C.A. veut ainsi encourager les réadhésions hâtives et de longue durée, de manière à diminuer nos frais et notre charge de travail. Rappelons ici que les adhésions peuvent être déductibles d'impôt, au même titre que les donations.

La S.Q.E. a maintenant un nouveau compte bancaire. Pour information, contactez-nous.

Au 1^{er} mars, la Société comptait 117 membres.

Rencontre estivale

La rencontre estivale de la S.Q.E. se tiendra au même endroit que l'année dernière. Ce sont les participants de l'an passé qui ont demandé de revenir! Nous nous réunirons dans une grande maison moderne, près d'un lac; canots et pédalos seront disponibles. Et pourquoi pas un feu de camp?

Programme libre. Des cours pour débutants auront lieu sur demande.

Date: de 12 au 14 juin. Arrivée après le souper, vendredi soir, et départ le dimanche après-midi. L'assemblée générale de la S.Q.E. se tiendra le dimanche matin.

Prix: 20\$/personne (coucher en chalet, chambres pour quelques personnes). Gratuit pour les enfants de moins

de onze ans qui n'utilisent pas un lit à part.

10\$/personne (coucher dans sa propre tente)

Ces prix ne comprennent pas les repas. Vous pouvez utiliser la cuisine toute équipée du centre, ou commander des repas de la S.Q.E. Les repas principaux proviendront du resto végétarien Bouffe-Nature, au prix de 6\$ chacun, alors que les déjeuners seront préparés par Patrice Mongeau, au prix de 3\$ chacun. Tous les prix incluent toutes les taxes.

Adresse: Aux Berges Dominique-Savio, 545, chemin du Lac, Sainte-Catherine-de-Hatley, en Estrie.

Somera renkontiĝo

La somera renkontiĝo de E.S.K. okazos samloke kiel pasintan jaron. La tiamaj ĉeestantoj tiel ŝatis la lokon, ke ili petis revenon! La renkontiĝejo staras apud lago, sur kiu eblas kanui, pedal-boati, kaj en kiu eblos naĝi. Ni esperu, ke la vetero estas bela, ĉi-foje. Programo estos libera.

Dato: de la 12^a ĝis la 14^a de junio. Oni alvenu post la vendreda vespermanĝo, kaj foriru dum la dimanĉa posttagmezo. Estos ĝenerala kunisdo de E.S.K. dimanĉan matenon.

Prezo: 20\$/homo, por dormi endome (en kelkopaj ĉambroj). Infanoj ĝis dek-jaraj partoprenos senpage, se ili ne okupos propran liton.

10\$/homo, por dormi en propra tendo

Tiuj prezoj ne inkluzivas manĝojn.

Tamen, eblas antaŭmendi manĝojn de la Societo. Ĉefajn manĝojn pretigos la vegetara restoracio Bouffe-Nature, po 6\$, kaj matenmanĝojn pretigos Patrice Mongeau, po 3\$. Ĉiujn prezojn inkluzivas ĉiujn impostojn. Se vi preferas mem kuiru, plenekipita kuirejo estos uzbla.

Adreso: Aux Berges Dominique-Savio, 545, chemin du Lac, Sainte-Catherine-de-Hatley, apud Sherbrooke.

Ej !... «Mi neniam filmis en Hollywood, ĉar estus al mi neeble esprimi mian vidadon de la realo en lingvo, kiu esprimas alian.»

Federico Fellini

SOMERA RENKONTIĜO — RENCONTRE ESTIVALE

1992.06.12-14

Aliĝilo — Formulaire d'inscription

Nomo(j):

Telefonnumero:

Nombre de partoprenantoj / nombre de participants:

Dormo en propra tendo / coucher sous la tente (10\$)

Dormo en domo / coucher en chalet (20\$)

Repas — Manĝoj

La commande et le paiement complet et non-remboursable des repas doit atteindre la Société **au plus tard** le vendredi 5 juin. Les commandes tardives **ne seront pas** remplies.

Mendo kaj plena neredonebla pago por manĝoj **nepre** atingu la Societon ĝis vendredo 5^a de junio. Malfruajn mendojn oni **ne** plenumos.

Sabaton / samedi

Matenmanĝo / déjeuner	x 3\$
Tagmanĝo / dîner	x 6\$
Vespermanĝo / souper	x 6\$

Dimanĉon / dimanche

Matenmanĝo / déjeuner	x 3\$
Tagmanĝo / dîner	x 6\$

Por la matenmanĝoj, mi deziras lakton bovinan / ordinaire

Pour les déjeuners, je demande du lait sojan / de soya

Donaco al E.S.K. / don à la S.Q.E. _____ \$

Sumo inkluzivita / somme incluse _____ \$

Sendu kun la pago al:

envoyer avec le paiement à:

Esperanto-Societo Kebekia

Société québécoise d'espéranto

6358-A, rue de Bordeaux

Montréal H2G 2R8

Le non-anglais à l'université

Henri Godard

Désormais la didactique linguistique a créé un concept original d'impérialisme linguistique: «le non-anglais»; qu'est-ce que l'italien, l'allemand, l'espagnol, le portugais, l'arabe, le russe, le chinois? C'est du non-anglais! Et le latin, le grec, le sanscrit, l'hébreu, le malais? Du non-anglais! Et le flammand, le corse, le breton, le gallois? Du non-anglais, du non-anglais!

L'univers linguistique bascule et se trouve coupé en deux: anglais d'un côté

et non-anglais de l'autre... Il est difficile d'imaginer ce qu'est l'aliénation linguistique tant qu'on a pas vu et entendu les déclarations méprisantes de ceux pour qui il n'est point de salut hors de l'anglais et qui considèrent tout autre langue que l'anglais comme du non-anglais, matière facultative comme la pêche à la ligne, la chasse aux papillons ou la philosophie.

[Esperanto-95, 4^e trimestre 1991]

Tro da misuzado pro la konfuzo

Marcel Ternant

Mi ĝis nun vane atendis reagon de kamarad(in)o, pli kompetenta ol mi, rilate la misuzadon oftan de la vorto *aktiveco* (ĉefe car Francoj, verŝajne pro la pluraj sencoj de tiu vorto en la Franca lingvo).

Nia kara Plena Ilustrita Vortaro bonvolu pardoni min ke mi intervenas nun kontraŭ ĝi. Vidu la radikon *aktiv/* sur la paĝa 24^a. Laŭ mi, *aktiveco* estas karaktero, eco de iu aktiva, dum io, pri

kio iu aktivas, devas esti *aktivaĵo*. Ekzemple, «la *aktiveco* de Henriko estas unu el liaj ĉefaj karakteroj; el ĝi fontas lia kapablo plenumi multajn *aktivaĵojn*»

Aktiveco estas karaktero, ĉu ne? Ĉu oni povas plenumi karakteron?

Ni ne ekkonsentu pri escepto, ĉar de escepto al escepto nia lingvo kaskade disfalos kaj fuŝiĝos.

[SAT-Amikaro, decembre 1991]

Mezlernejo André-Laurendeau, en Longueuil, volas internaciigi kaj reklasikigi sian programon. Ĉar estus granda malfermo pri instruado de Esperanto, du estraranoj de E.S.K. iris prezenti la aferon. Sed ilia nesalajreco kaj entuziasmo vekis suspektemon: ĉu tio ne estus sekteca afero?

Tabuaj vortoj en Esperanto, aŭ: la fivortaro

Andy E. Künzli

«Nek Zamenhof nek la aliaj pioniroj de Lingvo internacia en siaj verkoj uzis obscenajn vortojn, kvankam ĉiuj ili klopodis fari el Esperanto realan lingvon.

Unue la tabuaj vortoj publike aperis en "Sekretaj Sonetoj" de Peter Peneter en 1931 (?). Post kvardekkvinjara ekzistado Esperanto fariĝis plenrajta lingvo samkiel la naciaj.

Sed la vortaroj, kie i.a. estas tabuaj vortoj, ne multnombras. Ankoraŭ la esperantistaro hontas...

Ĝis nun la plej seriozan kontribuon por la sistemigo de la obscenaj vortoj kaj esprimoj faris Renato Corsetti per "Knedu min, sinjorino", kaj "Propono por kromvortaro".

La vortaro «Tabuaj Vortoj en Esperanto» daŭrigas la esploradon kaj pliriĉigas la tabuajn vortojn en Esperanto. La ekzemploj pravas, ke la lingvo povas esprimi ĉion, eĉ la plej intiman. Ili montras, ke la obscenaĵoj troveblas en

la literaturo, sur la strato aŭ en la lito...»

Jen la enkonduko al malgranda mirindaĵo, kiun kreis la kataluno Hektor Alos kaj la bulgaro Kiril Velkov. Ĝi nomiĝas «Tabuaj vortoj en Esperanto». 270 obscenaj kaj intimaj vortoj estas litigitaj alfabete kun klarigoj. En la dua parto oni povas ekkoni sinonimon de fiki, kaco, masturbi, piĉo kaj prostituto. Sekvas slangaĵoj kaj vortludoj, esprimoj kaj sakroj, insultoj, invitaĵoj foriri, mal-esprimoj kaj pika poezio. Kaj ĉio ĉi sur 23 malgrandaj paĝoj. Kaj intertempe la aŭtoroj jam elfosis 90 novajn terminojn kaj iam antaŭvidas duan eldonon...

Dum la vortaro verŝajne ŝokos unujn, ĝi plezurigos duajn kaj fariĝos necesa por triaj. Ĉiukaze ĝi devus formi suplementon de PIV! Ĉar multaj vortoj jam vaste uziĝas en Esperanto.

[TEJO-Tutmonde, nov.-dec. 1991]


La 12-erara teksto, sen eraroj

La defendo de nia pozicio parte dependas de kirastrajno, kiu, okaze de forta atako, en kvin minutoj povas alveni el Madrid. Por ĝustatempe venigi tiun trajnon oni aranĝis kun rapido kampotelefonon. Kiam la telefono estis pende fiksita kaj la laboristoj revenintaj, evidentiĝis, ke iuloke mankas kontaktilo, pro kio ĝi ne funkciis. Pli ol tri tagojn ni troviĝis tie, ĝis kiam fine venis muntisto, kiu riparigis la kontakton. Dum tiu tuta tempo oni agrable amuzis sin per la telefono... ne funkcia.

[Esperanto-95, 4^o trimestre 1991]

ĈU VI PENTAS ?


teksto kaj muziko: Borje Lund
surbendigita en la kasedo
"62 minutoj" de la grupo Persone



1. Ĉu vi pen-tas nun, ke vi mi-lit-ser-vis?
Dum la rek-ru-tad' vi ja ve-re ver-vis.
2. Ĉu vi pen-tas nun, ke vi mi-lit-ser-vis?
Dum la bomb-a-tak' vi ja ve-re ner-vis.




1. Ti-am pen-sis vi: "Mi fa-ri-ĝos vi-ro",
ram-pis kun fi-er' tra la kot' kaj ŝmi-ro.
2. Nun mal-a-mik-ar-me' ve-nas kun im-pe-to.
Sal-tu el la fo-saj', le-vu ba-jo-nej-ton.



1. Ho! Ki-a mal-bon-ŝanc, star-tas nun mi-li-to.
Ĉu sur-pri-zi-ĝas vi? Ha! K'la hi-po-kri-to!
2. Fi-mal-a-mik-sol-dat' fra-pas vin al-te-re,
Li-an in-dul-gon nun pe-tas vi sin-ce-re.



1. Nun pa-fas vi al land', ki-e vi jam es-tis.
Jes, vi vi-zi-tis ĝin, kaj vi ti-e fes-tis
2. Kaj li re-te-nas sin, kvan-kam li pi-kon-tis.
Kaj vi re-ko-nas lin, vi lin jam ren-kon-tis



1.&2.: en la I. J. K.

La verkinto tute ne pensis ke iam estos verŝajna lia kanzono, ke estos milito en lando, kie estis Internacia Junulara Kongreso. Tio tamen okazis: estis I.J.K. en Zagreb en 1988.

Helpe: pikontis: estis pikonta

L

S P

R

N T O

K O M

N

M O

Kiel vi vidas, sen UEA la Esperanto-komunumo estus apenaŭ rekonebla. Ĝi perdus multon. Eĉ sian sencon.

Per membriĝo en UEA aŭ ĝia junulara sekcio TEJO, vi aliĝas al tutmonda reto de pli ol 8 000 individuoj kaj 100 landaj kaj fakaj asocioj. Viaj estas:

La kontaktoj...

La Jarlibro de UEA kaj la Pasporta Servo de TEJO malfermas al vi mondon sen limoj.

La eldonajoj...

La plej kompleta Esperanta libroservo regalis vin en 1992 per sia renovigita katalogo de pli ol 3 000 libroj, kasedoj, vidbendoj kaj multe pli.

La kunlaboro...


La revuoj *Esperanto*, *TEJO-tutmonde* kaj *Kontakto* donas unike vastan perspektivon pri nia movado. Jen ĉio por efike aktivi, inkluzive optimismon!

Ne manku al nia komunumo. Aliĝu al UEA.

Sendu viajn kompletajn nomon kaj adreson, profesion kaj naskiĝdaton kun via kotizo (vd. kotiztabelon sube) al via landa peranto:

S-ino Merle Haltrecht-Matte, 7083 Notre Dame, Orleans, Ontario K1C 1J1

MA Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj revuon *Esperanto*), 52 dolaroj
 MA-T Juna Membro-Abonanto (ĝis 29 jaroj – ricevas ankaŭ *Kontakto*-n), 52 dolaroj
 MJ Membro kun Jarlibro (ricevas la Jarlibron, sed ne la revuon), 21 dolaroj
 MJ-T Juna Membro kun Jarlibro (ĝis 29 jaroj – ricevas ankaŭ *Kontakto*-n), 21 dolaroj
 MG Membro kun Gvidlibro (minimuma kategorio), 9 dolaroj
 DM Dumviva Membro (ricevas la Jarlibron kaj revuon dum la tuta vivo), 1300 dolaroj



Société québécoise d'espéranto
Esperanto-Societo Kebekia
6358-A, rue de Bordeaux
Montréal, Kebekio
H2G 2R8

